



Artikoloj tradukitaj de Gérard kaj Jeannine : La nanopesilo kapabla pesi virusojn La madagaskara vinko, tropika planto, kiu produktas antikancerajn molekulojn La blanka arbo en Montpellier, bela dombloko	Paĝoj 1-2 3 4	LA FASCINA NANOPESILO DE SEBASTIEN HENTZ Sébastien Hentz inventis novigan pesilon, kiu mezuras la mason de kelkaj virusoj, manĝantoj de bakterioj. Unu el la mankantaj ĉeneroj por disvolvi kuracadon per fagoterapio, alternativa al antibiotikoj. Raportado de Agnès Duperrin en Grenoble (Sudorienta Francio) en la revuo Notre Temps (Nia Tempo), Novembro 2019. Tute proksime de la Grenobla stacidomo, Minatec, vasta universitata areo dediĉita al la esplorado, staras malantaŭ kradoj, kiuj malfermiĝas nur per paspermeso. Ĉi tie laboras la miksa skipo de la CEA-CNRS-Inserm-Universitato de Grenoble Alpoj, kiu promesis prezenti al ni la unuan (kaj nuran) nanopesilon en la mondo. Ties konceptanto, Sébastien Hentz alvenas por renkonti nin. La sekvo rakontiĝas duvoĉe.  Agnès Duperrin kun Sébastien Hentz
Novelo tradukita de Jean-Mary : "La pasaĝerino" publikigita en la retejo https://short-edition.com/fr/	Paĝoj 4-8	De mekaniko al elektroniko. La du homoj povintus renkontiĝi en Metz, ĉar ili vivis en la sama kvartalo dum sia juneco. Iliaj ok jaroj de diferenco ne favoris la hazardon, unua preterlasita okazo. Tiuepoke, Sébastien turmentas sian kunvivantaron per demandoj, kaj malmuntas ĉion, kion li havas enmane « por kompreni kiel tio funkcias ». Lia patrino, porinfana helpanto, scias, ke la scivolo ne estas malbonaĵo. Kaj lia patro, laboratoria helpanto, estas ankaŭ pasia pri specimenoj kaj teknologio. Ĉio estas preta por kreskigi lian pasion por la mekaniko. Teknologia bakalaŭro en Loreno, supera lernejo- Normale Sup en Cachan

(Val de Marne 94), poste, agregacio ankoraŭ en mekaniko, jen li estas nature implikita en la esplora mondo. « Mi komencis elpensi strukturojn por protekti montarajn vojojn kontraŭ ŝtonfaloj : kiu dikeco, kiu formo por rezisteca ŝildo...Post ĉirkaŭiro en Milano, mi serĉis laboron ». La CEA (komisariato pri la atoma energio kaj pri la renovigeblaj energioj), serĉas tiuepoke specialiston pri mekaniko por elpensi mikrosistemojn el silicio por enmeti en elektronikaj aparatoj , kiel kompufonoj. Adiaŭ al la betonaj blokoj, bonveno en la erao de la pli kaj pli etaĵo kaj de la nanosistemoj, tiel maldikaj, ke eblas enmeti unu dekon en unuhara dikeco.


Alternativo al la antibiotika terapio.

« Ĝis nun, ni scipovis mezuri kamionan aŭ atoman mason, sed ni havis neniun ilon por pesi objektojn de meza maso kiel la virusoj », elvokas Sébastien Hentz. La Lorenano foriras al Usono por profundigi la aferon. Ĉi tie, li povintus renkonti Christophe Masselon, li mem en Amerika parentezo, sed finfine estas post ilia reveno, ke ili renkontiĝas en Grenoble. « Mi revenis decidema por plenigi tiun mankon. Christophe regis la masspektrometrojn, tiun teknikon, kiu klasifikas la molekulojn rilate al ilia maso. Mi estis specialisto pri la nano- sistemoj. Do, ni kunigis niajn kompetencojn. ».

Dum la esploristoj de la tuta mondo kurkonkursas por pesi la plej etajn partiklojn, la paro preferas direkti siajn laborojn al la plej utilaj. Kaj eĉ vivesencaj : penante pesi la virusojn, ili sin turnis al ĉenero, kiu mankas por disvolvi la fagoterapion, nekonata kuracado, kiu mobilizas la virusojn, manĝantoj de bakterioj. Tio, tiamaniere povus savi la malsanulojn, por kiuj la antibiotikoj ne plu efikas. Ankoraŭ necesas scipovi proponi kuracadojn reprodukteblajn kaj kontrolitajn.

En la mondo unuafoje realigitaĵo kaj promesplenaj komencoj.

Malantaŭ la vitra aperturo, la impona montaro ŝajnas atingebla. Kontrasto de skalo, kiel la granda maŝino antaŭ ni, kiu sciis la defion akcepti. Pli proksima de la komoda dimensio ol de personpesilo aŭ de kuireja pesilo, ĝi estas la frukto de kvinjara laboro. La du esploristoj klarigas ĝian principon. « Komence, ni enmetas la bakteriofagojn (virusoj, kiuj mortigas la bakteriojn) en likva formo en la enirejo. Ili estas vaporigitaj por havi nebulon de tre malgrandaj gutetoj, kiuj estas suĉitaj vakue. » Dua etapo : la partikla fakso estas koncentrita sur surfaceto dank'al aerodinamika lenso. Ĉio estas preta por la kalkulado dank'al retaĵo de nano-resoniloj mekanikaj.



Christophe Masselon (maldekstre) kaj Sébastien Hentz antaŭ la nanopesilo

Antaŭ mia demanda rigardo, Christophe Masselon klarigas per gitara bildo. « Tiuj nano- sistemoj funkcias kiel la kordoj, kiuj vibras. Kiam la partikloj deponiĝas en ĝi, ili ŝanĝas sian tonalon depende de sia maso, kiel la sono de kordo varias laŭ la fingra premo. »

La rezultoj estas tie, publikitaj en la prestiĝa revuo Science, en novembro 2018 : Sébastien Hentz kaj liaj kolegoj ĵus sukcesis mezuri la mason de bakteriofaga kapsido (la kovraĵo entenanta ĝian DNA). Tio estas en la mondo unuafoje realigitaĵo ! Kaj ĉefe komenco por multaj malsanuloj en terapia malsukceso.

Kio estas la fagoterapio ?

Estas tekniko malkovrita en 1917 en Pasteur Instituto kaj ĉie forlasita, krom en Georgio, profite al antibiotikoj. Ĝi uzas bakteriofagojn (mortigantajn bakteriojn) virusojn kaj povus esti utila kaze de laksego, pneŭmonio, vundo ... rezistaj al antibiotikoj.

MADAGASKARA VINKO AŬ ROZA KATARANTO

Esploristoj el la Tura Universato malkovris la mekanismon pri produktado de antikanceraj molekuloj entenataj en la tropika planto.

Tropika planto kun antikanceraj efikoj.



Estas tre longtempa serĉado, kiu ĵus sukcesis en la laboratorioj de la Tura Universitato. De baldaŭ 60 jaroj, sciencistoj de la tuta mondo strebis malkovri la misterojn de la madagaskara vinko.

Post 15jara laborado, skipo de turanaj esploristoj el la laboratorio pri vegetalaj bioteknologioj ĵus precize elmontris, kiamaniere tiu planto produktas la vinblastinon kaj la vinkristinon, du kompleksajn molekulojn kun sendubaj efikoj antikanceraj.

« Ni analizis la vinkgenaron por malkovri la du enzimojn agantajn en la produkto de tiuj molekuloj », resumas la kuracisto Vincent Courdavault, kiu direktis tiujn esplorojn.

Tiuj estis kondukataj partnerece kun angla skipo el la John Innes Centro de Norwich. Ili estis oficiale publikigitaj la 3an de Majo 2018 en la revuo « Science ».

Produkti malplikostajn medikamentojn.

Krom la scienca atingo, la malkovro de la turanaj sciencistoj malfermas novajn perspektivojn, aparte por la kuracado de endokrinaj kanceraj.

Ĝis nun, la vinblastino kaj la vinkristino estas produktataj en tre malgrandaj kvantoj pro la malfacilaĵoj ligitaj al la kultivado de la madagaskara vinko : « La regado de la biosintezo de tiuj molekuloj ebligas la transdonon de tiuj genoj en gistojn aŭ en aliajn plantojn por kreskigi la malplikostan medikamentoprodukton, sen provizada problemoj kiel aktuale », klarigas la kuracisto Courdavault.

Ekde nun, la esploristoj de la Tura Universitato laboras kun la grupo Axyntis (de Pithiviers, en la departemento Loiret) por disvolvi tiujn novajn bio-medikamentojn, kiuj povus surmerkatigi post 3 jaroj.

La skipo de la kuracisto Courdavault ankaŭ studas aliajn plantojn kun antikanceraj efikoj kiel la podofilon (podophyllum : familio de berberisacoj) ofte preskribatan por lukti kontraŭ la digestaj kaj hepataj pertuboj.

Pascal Denis.

Artikolo eltirita de la tagĵurnalo « La Nouvelle République » de la 19a de Julio 2018.

Vinblastino : C46, H58, N4, O9. Vinkristino : C46, H56, N4, O10; alkaloido.



La teamo de D-ro Vincent Courdavault bezonis 15 jarojn por analizi la kompletan genaron de la madagaskara vinko.

LA BLANKA ARBO EN MONTPELIERO (sudorienta Francio)

La retejo *ArchDaily specialiĝinta pri* arkitekturo elektis la blankan Arbon en Montpellier « la plej bela dombloko en la mondo ». Tiu konstruaĵo naskiĝis lastan printempon ĉe la bordoj de la rivero Lez. Ĝi estis elpensita de la japana arkitekto Sou Fujimoto. Tiu miriga konstruaĵo entenas 17 etaĝojn kaj 113 loĝejojn ekipitajn de balkonoj hirtigitaj kaj lokitaj supre de la vakuo kaj ankaŭ havas panoraman startrinkej-restoracion sur la lasta etaĝo.



LE FIL DES ANS

Mai / Juin 2020 n° 267

La pasaĝerino

Far Marie B.

Originala verko skribita en la franca

Estas tagmeze ĉe la Norda Stacidomo.

Mi ĉiam alvenas longe antaŭ la forveturo de la trajno, mi ŝatas la apartan etoson, kiu antaŭas la vojaĝon.

Mi paŝas laŭlonge de la kajo, ĝis la stirejo.

Ankoraŭ ne estas vojaĝontoj.

Mi salutas permane la mekanikistojn, kiuj, inter la vagonoj, moviĝas antaŭ la kupliloj kaj, ekipitaj per grandaj universalaj boltiloj, malplilongigas la ĉenerojn.

La ĉirkaŭaĵo de la restoracivagono ĉiam estas movoplena : ĉe la menuo, graskokinoj, kies kelkajn plumojn mi vidas eskapi el la kartonoj. Estas amasetoj da brasikoj, karotoj, bukedoj da poreo. La ĉefkuiristo taŭzas siajn komizojn, por ke ili ŝarĝu la tutplenajn latkestojn. Ili

ekkuiros tuj post la forveturo de la trajno.

Aliloke la servistinoj findisdonas sur ĉiun vagonliteton la bone falditajn kovrilojn kaj littukojn.

Ĉiuj preparas la grandan vojaĝon de la okcidento-oriento-eksprestrajno.

Post unu horo kuniĝos kun mi alia stiristo kaj la du kontrolistoj. Kune ni foriros por sestaga vojaĝo : du tagoj kaj duono por ĉiu vojiro kaj unutaga paŭzo en Moskvo, por ripozigi la homojn, bonteni la maŝinon. Ĉiuj tri venos kuniĝi kun mi en la malgrandan kajuton, du kuŝejoj kaj unu tualetejo, kie ni alterne dormos, la unuaj je la noktiĝo, la aliaj je la sunleviĝo.

Kaj la багаĝoĉaroj interfrapiĝos meze de krioj de senjakaj portistoj, kiuj insultas sin reciproke por pasi unue – la trinkmonoj dependas de tio – kaj ŝarĝi valizojn kaj pakaĵojn per grandaj ŝultrobatoj, tra la malfermitaj fenestroj.

La vojaĝontoj envagoniĝos, post grandaj korelverŝoj, aŭ diskretaj kisoj. Ili lokiĝos en tion, kio estos ilia ŝirmejo dum tiu longa vojaĝo, privata kajuto, supermetita aŭ simpla liteto, sidloko en la kupeoj, ĉiufanke



Norda Stacidomo, Parizo

de la granda fenestro, el kiu estas danĝerege kliniĝi, en ĉiuj lingvoj.

Estas la 16a ĉe la Norda Stacidomo.

La staciestro longe ekfajfas, la lastaj amantoj devas disiĝi. Oni sendas kisojn, oni svingas naztukojn, oni perdiĝas el la vido ĉe la unua trafikforke. Mi rigardas Parizon malproksimiĝi ; mi ekstiros mian belan noktan trajnon ĉe la noktiĝo en la Strasburga Stacidomo, kie kelkaj vojaĝantoj malpacientiĝos, frostemaj, en atendejo malfermita al ĉiuj ventoj.

Ni transveturos la germanan landlimon. Deviga halto por ebligi al la doganistoj kontroli la pasportojn ; se ĉio estos en ordo, ni ĉiuj reforiros, se ne, la kulpulo devos eltrajniĝi senindulge. Li restos mallibera, sub la flavigitaj lumoj de la landlima policejo, dum la trajno ekhastos tra Vestfalia dormanta en la nokto.

Mi estas sola en mia stirejo ; la kontrolisto venos viziti min por kuntrinki kafon, li rakontos al mi pri la sendorma junulo, kiu fumas en la startrinkvagono envie rigardante la belulilon volviĝintan sur la benketo, pri la ebrieta kliento de la restoracivagono, la efemeraj amoj, kaj la ĉifitaj jupoj.

En Karlsruhe la staciestro frapetos kontraŭ mia fenestro. Manpremo, du aŭ tri amikaj vortoj, longa ekfajfo kaj jen ni reekiras ĝis la noktofino.

Ĉe la sunleviĝo ni estos en Frankfurto. Mi iros ripozi lasante al mia kolego la sinistran « landliman kontrolon » de la transiro orienten, eĉ se la malvarma milito iom plivarmiĝis. Mi evitos vidi la murojn el betono, kiuj laŭiras la fervojon, kaj la kilometrojn da pikdratoj. Mi rapide prezentos la reglamentajn legitimilojn kaj reeniĝos en

profundan dormon. Mi malŝatas por ĉiam la bruon de botoj, la armitajn soldatojn, la homajn blekojn -- pli malbonajn ol tiuj de iliaj hundoj -- kaj tiun malkonvenan ekscitiĝon, kiam ili malkovras ĉe pasaĝero ion, kio ne estas en ordo.

Kiam ni traveturos la Brandenburgan regionon, mi reekhavos mian deĵoron por la dua punkto de nia granda vojaĝo, kaj kiam ni estos transpasintaj la stacidomon de Poznan, ŝi venos kuniĝi kun mi , kiel en ĉiu vojaĝo.

Poznan estas en la brumo, la malmultaj stratlampoj desegnas

kronojn de malĝoja kaj malpura blanko, en la punkta nigro. Ankoraŭ unufoje la varme vestitaj pasaĝeroj en- kaj eltrajniĝas en grandaj rosumaj volutoj. Mi atendas en mia stirejo la longan ekfajfon, por ke ni reekiru en la direkto al Varsovio.

Mi gvas, samtempe angora kaj malpacienca, la alvenon de mia stranga vizitantino.

Unue, la malvarma aero subite invadas la stirejon, ne tiu, kiu venas el ekstere, kiam oni malfermas la pordojn - tiu, kiu kunportas malgrandajn flokojn aŭ gutojn da prujno - ne, vera malvarmo, tera, kruda, malvarmo de tomboŝtono, malvarmo de mondo fino.

Ŝi estas survoje. Ŝi estas alvenonta senbrue, kiel veninte el nenio. Tenebra lumoj kaj blanka halo, kaj ŝia silueto en ekvilibro, kun piedoj ne tuŝantaj la plankon, ŝi estas plenigonta per sia malaperema ĉeesto mian malgrandan stirejon.

Ŝi staras antaŭ la ventoŝirmilo, kun la okuloj larĝe malfermitaj. Ŝi fikse rigardas la pejzaĝon, kiu preterpasas antaŭ ni.

Ŝi tiel akompanas min per sia silenta kaj efemera ĉeesto ekde mia unua vojaĝo, en 1962, la unuaj oriento-okcidento-eksprestrajnoj post la malvarma milito, jam antaŭ tri jaroj. La unuan fojon mi sentis ŝian ĉeeston, mi videtis ŝian silueton tute vestitan de blanko, mi kredis, ke juna virino en geedziĝa vojaĝo perdiĝis, mi demandis ŝin pri tio, kion ŝi volis, kaj ĉar la kontrolisto ĵus kuniĝis kun ni, mi estis



rekomendonta al li mian perdiĝintan edziniĝanton, por akompanigi ŝin ĝis ŝia edzo, en unu el tiuj intimaj kaj komfortaj kajutoj.

— Sed vi parolas sola, diras al mi la kontrolisto, donante al mi fortan batpuŝon sur la supron de la ŝultroj. Atentu, ne ekfreneziĝu, vi estas tiu, kiu stiras la trajnon, kaj tute ne plaĉus al mi ekpaneĵi ĉi tie kun tia malvarmego !

Li ne vidis ŝin, kaj kiam ŝi trairis la kupean septon kaj forvaporigis meze de la homoj kubutapogataj ĉe la fenestroj, sen ke neniu el ili deturnas la kapon, mi timegis, komprenante la fantoman signifon de tiu aperaĵo.

He, vere ŝajnas, ke vi vidis fantomon ! Diris al mi la stiristo, sekvante mian rigardon.

— Eble, mi respondas provante koncentriĝi sur la fuĝa sed tamen paralela linio de la fervojo, tie ĝuste antaŭ mi.

Mi vere ne sciis kial, sed mi preferis ne rakonti al li tiun historion pri ektoplasmo.

Ŝi revenis la sekvantan vojaĝon, ĉiam post la sama stacidomo, kaj tiunokte ŝi ankoraŭ restis silenta, pririgardante la polan kamparon, sen ke okazas nenio alia krom ŝia stranga ĉeesto.

Ne kuraĝante moviĝi, kaj kompreneble senvorte, mi rigardis ŝian speguliĝon sur la glaco. Ŝi surhavis puntan robon iom dekoltitan per organdia falbalo, kies longaj manikoj estis mallarĝigitaj ĉe la manradikoj per silka kordoneto. Sur la strikta korsaĵo, kvin perlamotaj butonoj sekvis la noĉon inter du rondaj mametoj, kaj la jupo, alĝustigita al ŝiaj mallarĝaj koksoj, finiĝis en la pufofaldaro de trenaĵo el punto el

Alensono (*1). Ŝiaj malaranĝitaj longaj haroj, en kiuj restis kelkaj floroj, kiuj verŝajne tenis vualon de edziniĝanto. Ŝia vizaĝo estis pala, travidebla, ĉagrena vizaĝo, kiun plu nenio iam konsolos.

Tiel ĉiuvojaĝe ŝi akompanis min inter la stacidomo de Poznań kaj tiu de Varsovio. Ŝi faris nenion alian krom stari apud mi kaj rigardi la pejzaĝon preterpasi antaŭ ni kaj fine mi ŝatis tiun malkonvenan ĉeeston de la fantomo de la edziniĝanto en la Parizo – Moskvo trajno. Kiu ŝi estis kaj kial en tiu trajno ? Fine de sindikata kunveno, kiam la biero ekfluas kaj la spiritoj malstreĉiĝas, mi lanĉis la temon pri la urbaj legendoj de la SNCF (*2). Iuj maljunaj fervojistoj estis rakontintaj al mi bizarajn historiojn, strangajn okazaĵojn, sed neniu iam elvokis la emocian fantomon de iu edziniĝanto.

Mi estis serĉinta en la arkivoj, ĉu iam okazis akcidento kun novgeedzoj trajntrafitaj ĉe traknivelpasejo, ĉu estis fianĉo malaperinta en trajno, puŝjetita sur la balaston, terurigita edziniĝanto ĵetiĝanta sub la radojn. Nenio, vere nenio tia iam okazis, ankoraŭ malpli ofte en la Parizo-Moskvo trajno. Tiam, iun vesperon, kiam ŝi rigardis preterpasi la senhoman kaj arbarkovritan pejzaĝon, la malheligitajn vilaĝojn, kaj la nigrajn trunkojn de la sinistraj pinoj en la neĝo, la senfinajn kampojn, ne kapablante plu rezisti, mi fine aŭdacis demandi al ŝi, kiu ŝi estas.

Ŝi turniĝis al mi kaj mi vidis ŝian rigardon rigidiĝi en la mia, stranga sento, kiel maldorma sonĝo, la bela edziniĝanto parolis al mi senvorte.

Mi unue vidis virinojn ĉirkaŭ junulino, ĝojan rondon, la robon sur la vestarko, kaj poste, kun la brakoj



levitaj, la puntan gainon, kiu glitas laŭlonge de la fleksebla kaj delica korpo, punto el Alensono (*1), kaj kvin perlamotajn butonojn sub malpaciencaj fingroj.

La edziniĝanto rigardas min kaj mi rekonas ŝin, belan junulinon rozan pro ekscitiĝo kaj ridetantan al la radia estonto de bela tago, kun la haroj volvitaj sur ringo da floroj. Pli aĝa virino, verŝajne ties patrino, alkroĉas al ŝi la vualon, nur iom da punto, vapora voluto.



Varsovia Stacidomo

– Kio okazis al vi ?

Ŝi aldiris nenion kaj malaperis kiel ĉiufoje. Ni estis ekvidantaj la stacidomon de Varsovio. Dum la posta vojaĝo mi malpacience atendis ŝin ; la du tagoj, kiuj antaŭis la alvenon en la stacidomon de Poznan ŝajnis al mi senfinaj. Kiam ŝi aperis, mi redemandis ŝin :

--Kial vi estas tie ?

Nenio okazis, ŝi restis senmova pririgardante la horizonton, kaj poste, en la preciza momento, kiam ŝi estis malaperonta, ŝi rigardis min. Estis al mi kvazaŭ tremeto, io fuĝa, la vizio

de kurado, ŝia vualo forflugis kaj ŝia malaranĝita hartubero ellasis ondon da hirtaj haroj. Mi sentis malesperon en tiu senbremsa kurado, strato, buso, ŝoko, kaj mi nenion plu vidis, specon de nigra truo, el kies fundo rigardis min la fantomo de mia malĝoja edziniĝanto.

Ŝi plu aperis dum ĉiu vojaĝo mia sed neniam plu respondis miajn demandojn.

Hodiaŭ okazas mia lasta vojaĝo kaj ĉar ŝi aperas nur al mi de ĉiuj tiuj jaroj, mi kredas, ke estas bone diri tion al ŝi :

– La lastan fojon mi stiras tiun trajnon, mi emeritiĝas fine de la vojaĝo. Vi mankos al mi, mia bela edziniĝanto, pri kiu mi preskaŭ nenion scias.

Mi sentas ŝian malvarman rigardon, ŝiaj okuloj pririgardas min kaj mi preskaŭ timas. Mi sentas, ke ŝi estas fine dironta al mi, kial ŝi estas en mia trajno de tiom da jaroj inter Poznan kaj Varsovio. Pli bone estintus, se mi neniam sciintus tion.

La fantomo pririgardas min, ŝiaj okuloj traboras min kaj mi vidas ŝin starantan en edziniĝrobo, je la brako de sia patro en urbodomo. Ĉirkaŭ ŝi ŝiaj gepatroj, ŝiaj amikoj, malmultaj homoj, ŝi atendas, unue malpacienca, feliĉ- kaj ĝojradia, sed ŝia rideto iom post iom fandiĝas en larmoj, ŝia patrino konsolas ŝin, ŝiaj fratinoj kaj amikinoj ĉirkaŭas ŝin. La tempo pasas. Iom post iom ŝi komprenas, ke li ne venos. Ke li ne plu venos.

La pola arbaro nun englutas nin, ŝi rigardas antaŭen kaj serĉas Dio scias kion funde de la nokto prilumata de la luno.

– Sed kion vi serĉas, kial en ĉiu vojaĝo, kial tiu pejzaĝo kaj kial kun mi ĉar verŝajne nur mi vidas vin ? Tiam ŝia malplena rigardo denove traboras min kaj frosta tremeto glitas laŭlonge de mia dorso. Nun estas amaso da homoj, unuj portantaj vestaĵpaketon, aliaj sin subtenantaj reciproke. Maljunuloj, paroj, infanoj, kaj meze de tiu sinistra kohorto, junulo en vestaĵo, kun kolumo malbone tenita de la nodo de kravato, kiu pendas, senutila sur lia malfermita ĉemizo. Kun perdita rigardo li antaŭeniras sur la kajo. Mi vidas lin, kiu alparolas al la vico da soldatoj kaj la germanaj ŝafhundoj respondas lin mordante la malsupron de lia pantalono. La viro provas forfuĝi, sed pro unu nura kolbobato li komprenas, ke ĉio estas senutila. Tiutage li ne venos al la urbodomo por diri jes al la virino, kiu lin amas kaj atendas. Li ne plu venos. Oni lin tiras, pelas, plia amas-arestado, en unu el tiuj bestovagonoj, sur kiu estas skribita la plej sinistra celloko :





Aŭŝvico : koncentrejo de nazia Germanio

Auschwitz (Aŭŝvico).

Tiam mi komprenas, kial mi, kial tiu trajno. Auschwitz, la terura nomo, kiun mi deziras forgesi. Mi estis nur ero en tiu abomena ĉeno. Mi faris nur mian laboron kiel trajnstiristo. Tiu nigra periodo, kiun mi enigis de pli ol dudek jaroj en la fundon de mia memoro, ĉiam dirante al mi, ke mi neniel respondecas pri tio. Abomena homa ero de sistemo, kiu superis nin ĉiujn. Mi sciis sen scii, stirante rekte antaŭen, surda kaj blinda, ignorante la nedireblaĵon dum la tuta vojaĝo, rifuzante forlasi la trajnstirejon tiel longe, dum la kajoj de la abomena stacidomo de Auschwitz Birkenau ne senhomiĝis. Mi atendis, ŝtopante la okulojn kaj orelojn, ĝis la silento fine revenos, por forlasi tiun lokon kaj restiri mian trajnon al la stacidomo de Drancy.

Mi faris ĉion por forgesi, inkluzive de la

malsukcesinta ago iĝi volontulo por stiri la Parizo-Moskvo Trajnon. Preskaŭ la sama vojaĝo, la samaj pejzaĝoj, por forigi la abomenan memoraĵon de tiuj plumbosigelitaj vagonoj, por forgesi, stiri trajnon plenan je liberaj vojaĝantoj, kiuj ĝuas intimajn kajutlitetojn, komfortajn vagonojn, kaj rafinitajn manĝaĵojn en la restoracivagono.

Sed nun, sub la kava rigardo de mia livida edziniĝanto, memoraĵoj alfluas : krioj, hurloj, pafsinsekvoj, kolbobatoj kaj kadavroj ĵetitaj al sovaĝaj bestoj dum la tuta vojaĝo. Eble mi estas tiu, kiu kiel aĉe servema dungito kondukis al la morto ŝian kompatindan fianĉon ? Ĉu tio vere gravas ? Kion tio estus ŝanĝinta, fakte ?

Kaj subite mi sentas fajrofulmon funde de miaj intestoj, specon de eksplodo meze de mia cerbo, mi apenaŭ havas la tempon premi la vicbremson antaŭ ol droni en la infiniton de mia propra nokto. Malvarmo, silento, mi kontemplas mian korpon fleksiĝintan sur la seĝon. La terurigita kontrolisto trankviligas la scivolemajn vojaĝantojn, kiuj demandas sin, kial la trajno subite haltis en la pola arbaro. Ĉio tio fariĝas malklara, malproksima, kaj mi vidas min ŝvebi super la fervojo, kiam ŝi prenas min je la mano kaj kuntiras min kun si.

Ni foriĝas, englutitaj meze de koŝmara pejzaĝo. Jen mi kondamnita por ĉiam serĉi kun ŝi la torturitan fantomon de ŝia perdita fianĉo.

Ni foriĝas, englutitaj meze de koŝmara pejzaĝo. Jen mi kondamnita por ĉiam serĉi kun ŝi la torturitan fantomon de ŝia perdita fianĉo.

*1 : Alenŝono : urbo en Normandio, fama pro siaj punktoj, france Alençon.

*2 : SNCF : Ŝtata Kompanio de Francaj Fervojoj, france Société Nationale des Chemins de fer Français.



Drancy, 11,5 km for de la Pariza Norda Stacidomo